Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung
Aperas monate
Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 7-9
4-a JARO
JULIO-SEPTEMBRO 1949

EL LA ENHAVO:

Graz — plena sukceso
Rudolf Michael Frey †
Aŭstria E-poŝtmarko — gravega sukceso
La Esperanto-movado en Aŭstrio
Informoj de Laborista Esperantistaro
Katolika Esperanta Vivo
Internacia Esperanto-movado
Bibliografio

LASTA INFORMO:

Radio-Wien ekde mezo de Oktobro sendos Esperanton ĉiun lundon 6.30—6.35 kaj ĉiun duan vendredon 16.40—16.55. Detaloj sekvos.
Radio-Alpenland ekde la 7a de Oktobro sendos Esp.-Kurson de prof. Hainschegg ĉiun vendredon 15.30.

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- kaj eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4,—. Ni petas, skribu bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — S-ro Rudolf Schmitz, 45 j. kamplaboristo en Tölz n-ro 35, ĉe Aflenz, Ober-Steiermark, kor. kun en- kaj eksterlandaj s-aninoj.

Germanujo. — S-rino Anna Berndt, (13b) Seeshaupt 106, Obb., kor kun s-an(in)o el Graz. Mi ankoraŭ estas lernantino.

Lingvolernejo „Minerva"
(Dr. Ekhard Mahovsky)
Wien I., Heinrichsgasse 2 **Tel. U 27-3-17**
Dumtagaj kaj vesperaj kursoj pri 17 lingvoj inkluzive
ESPERANTO
(ankaŭ preparkurso por la ŝtata ekzameno pri instrukapableco)
Preparkursoj por la abiturienta ekzameno, speciale por ŝtatoficistoj
Petu prospektojn!

Vi nepre devas legi la interesan ilustritan aŭstrian E-gazeton
MONDA TRIBUNO
Internacia gazeto por kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko. MT ne okupiĝas pri organizaj aŭ politikaj aferoj. Petu prov-ekzempleron de la eldonejo kontraŭ reafranko aŭ int. resp. kup.
Redaktejo kaj administrejo: Vieno IX., Rossauerlände 27. Jara abonprezo por eksterlando 2 us. dol. aŭ egalvaloro. Por AEF-anoj ŝil. 12.—.

AŬSTRIA
ESPERANTO-REVUO

4-a jaro | JULIO/SEPTEMBRO 1949 | n-ro 7—9

Graz—plena sukceso

450 geesperantistoj el ĉiuj federaciaj landoj de Aŭstrio partoprenis inter la 16.—20. Julio ĉj. la 3. Aŭstrian Esperanto-Kongreson en la stiria ĉefurbo G r a z. Krome povis esti kore salutataj karaj gastoj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Holando, Hungarujo, Svedujo, Svisujo kaj en la lasta tago ankaŭ aŭtobusa karavano el Danlando, 32 personoj sub la gvidado de s-ano Nielsen.

En la plej moderna salono de Graz, en la Laborista ĉambro estis la 16an de Julio la solena malfermo de la kongreso kaj la interkonatiĝo. Mankas la loko por elmontri ĉiujn eminentulojn kaj aŭtoritatulojn, kiuj partoprenis tiun aranĝon. La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, la meritplena s-ano profesoro d-ro Adolf H a i n s c h e g g en preskaŭ duonhora bonveniga parolo tre kore salutis ilin, speciale niajn eksterlandajn ges-anojn, kiuj poste per mallongaj alparoladoj danke respondis. Aplaŭdegon rikoltis la aŭstria ĝeneral-poŝtdirektoro d-ro Karl D w o r s c h a k, al kies energia iniciato ni dankas la eldonon de la ŝtata Esperanto-poŝtmarko.

Malnovaj geamikoj renkontiĝis, inter ili korespondintoj dum longa tempo, kiuj nun la unuan fojon persone konatiĝis en ĝoja interparolado.

La urba orkestro, majstre direktata de s-ro Alfred Muchitsch, ludis klasikajn kaj aŭstriajn muzikaĵojn. S-ano L o r e n z o, la en Aŭstrio bone konata kantisto, kiu mem esperantigis diversajn kantojn kaj ariojn, montris sian kantarton. La kulmino estis la himno Esperanta, kantita de ĉiuj ĉeestantoj.

En la dua vespero okazis „Steirer Abend", dum kiu Stirianoj montris multe aplaŭditajn popolajn dancojn kaj kantojn. Prezentis en la tria vespero kvarteto de la operejo en Graz klazikan muzikon kaj la mondkonata franca s-anino Marguerite S a n t r e u i l belege kantis esperantajn kantoĵn. Magiisto mirigis la rigardantaron per neimageblaj sorĉaĵoj.

Vizito al Schlossberg (kastelmonto) kaj al famkonata Lurgroto en Peggaŭ (kaverno 3 km longa), kie troviĝas stalaktitoj, stalagmitoj,

ŝton-kurtenoj kaj bestfiguroj k. s. fariĝintaj per si mem el gutŝtonaĵo, kelkmilojn da jaroj aĝaj, trovis la grandan intereson de la partoprenantoj. Publikaj koncertoj sur la ĉefplaco de la Popolĝardeno agrable kaj rapide pasigis la tempon. Ĉie kie kunvenis esperantistoj dum la tagoj en Graz, estis bona okazo por interamikiĝi aŭ kun aŭstriaj aŭ kun eksterlandaj ges-anoj, kiuj precipe prezentis sin kiel bonegaj homoj.

Sed la kongresanoj ne nur kunvenis por amuziĝi. En multaj fakkunsidoj la aŭstriaj ges-anoj laboris, raportante pri pasintaj sukcesoj, spertoj aŭ pridiskutante estontajn taskojn kaj novajn eblecojn por antaŭenpuŝi la E-movadon. Poŝtistoj, fervojistoj, tramistoj, laboristoj, katolikoj, naturamikoj, instruistoj, UEA-anoj kaj SAT-anoj traktis siajn specialajn aferojn kaj faris bonegan laboron por la sekvonta organiza periodo.

La ĉefkunvenon de AEF la 19an de Julio, prezidatan de s-ano eksministro d-ro Hans F r e n z e l, partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj. Starante memoris la alestantoj la ok mortintajn ges-anojn dum la pasinta agadperiodo, precipe s-anon kalkulkonsilanton Rudolf M. F r e y, kiu preskaŭ je la sama horo estis entombigata en Wien kaj kiu ĝis la lasta spiro laboris por la venko de Esperanto. Dum unu minuto regis memora silento en la salonego.

La ampleksa raporto de nia nelacigebla afergvidanto s-ano Rajmund C e c h rememorigis pri multaj sukcesoj atingitaj dum la lasta jaro. E-lektoratoj en la universitatoj de Innsbruck, Salzburg kaj Graz, enkonduko de E-kursoj ĉe la polico de Vieno kaj Innsbruck, radiodisaŭdigoj esperantlingvaj en Vieno kaj Graz, enkonduko de Esperanto ĉe la ŝtata Fremdultrafik-oficejo en Vieno, eldono de la ampleksa 354-paĝa vortaro germano-esperanta kaj la kronigo de ĉio, la ŝtata oficiala eldono de Esperanto-poŝtmarko estas nur cito de la plej gravaj sukcesoj. Sed ni esperu, ke per la espereble baldaŭa efektiviĝo de aŭstria ŝtatkontrakto forfalos diversaj bariloj kaj niaj interrilatoj kun niaj eksterlandaj samcelaj organizoj ankoraŭ pli pliboniĝos kaj vasta Esperantista publiko vizitos nian belan landon, al kiu ni prezentos ne nur nian gastamon, sed ankaŭ nian interfratiĝ- kaj pacemon.

Sekvis la raportoj de la kasistino, de la kontrolo, redakcio, Esperanto-Instituto, AEF-landestraroj kaj delegitoj, fakgrupoj ktp. El ĉiuj raportoj oni povis ĉerpi la konvinkon, ke ĉiuj funkciuloj laboris laŭ la eblecoj en la nuna malfacila politika kaj ekonomia situacio de Aŭstrio.

La novelekto de la centra estraro de AEF rezultigis preskaŭ la saman funkciularon kiel pasintjare. Kun aplaŭdego la ĉefkunveno denove elektis ĝeneral-poŝtdirektoron d-ron Karl D w o r s c h a k HONORA PREZIDANTO de AEF. Prezidantoj restas eksministro d-ro

Hans Frenzel, d-ro Führing kaj d-ro Grimme. Novelektiĝis d-ro A. Halbedl (Knittelfeld). Bedaŭrinde s-ano Alfred Berdan, la elprovita redaktoro de la Aŭstria Esperanto-Revuo, pro malsaniĝo devis rezigni sian funkcion. Anstataŭ li nun redaktos la organon kvarmembra komitato. La ĉefkunveno esprimis sian dankon al s-ano Berdan, kiu per sia laboro ŝatigis nian Revuon en la tuta mondo.

La aŭstria Esperanto-Instituto aranĝis prelegojn en germana kaj Esperanta lingvoj. Profesoro H a i n s c h e g g majstre parolis pri Esperanto kaj Mondliteraturo. La ĉefe neesperantista publiko dankis lin per aplaŭdego. S-ano Ernst W e r n e r, Wien, prelegis pri la originala stilo de Esperanto. Lia esperantlingva parolado estis la plej modela en la kongreso.

La eksterlandaj kaj aŭstriaj kongresdelegitoj estis akceptataj de la vicurbestro de Graz Hermann A u s t, en la belega kunsidsalono de la urbdomo kaj al ĉiu estis donata libro pri Graz. Dum sia parolado la vicurbestro akcentis, ke Graz ĉiam subtenos Esperanton, tiamaniere kunhelpante atingi kaj restigi pacan kunvivadon inter la popoloj diverslande. Eksministro d-ro Frenzel respondis, ke ĝuste Aŭstrio kuŝanta meze de la multnacia Eŭropo bezonas Esperanton, ĉar nur per tiu ĉi neŭtrala lingvo la reciprokaj intertraktadoj de la ekonomiaj kaj politikaj aferoj sukcesplene kaj sen interpretaj eraroj povos esti solvitaj. Precipe ni devas antaŭenpuŝi la movadon estante la ponto inter oriento kaj okcidento, kiu interligas diversajn popolojn. Oni ankaŭ povas diri, ke Aŭstrio kvazaŭ estas la koro de la kontinento.

Post tiu ĉi solena akcepto en la urbdomo sekvis la inaŭguro de la novnomita „Esperantoplatz“ (Esperanto-placo) en unu el la plej frekventataj lokoj de Graz. Eble estas kvazaŭ simbolo, ke tiu ĉi placo estas bombdetruita kaj tion alludante la urbestro en sia parolado menciis, ke espereble per Esperanto la popoloj povos interkompreniĝi kaj pace trakti siajn aferojn por tiamaniere malhelpi militon eĉ pli teruran ol la lasta mondkatastrofo.

Katolika Di-servo apartenis al la gravaj aranĝoj de la kongreso. Ĝi okazis en la Ursulinen-preĝejo kaj multaj geesperantistoj edifite aŭskultis la meson de Schubert, kantitan en Esperanto.

Resume oni povas diri, ke la tria Aŭstria Esperanto-Kongreso digne enviciĝis en la antaŭe okazintaj kaj ni devas kore danki al la LKK kaj Graz-anoj por la bonega organizado de la kongreso kaj afabla akcepto de la partoprenantoj. Sed specialan dankon meritas la s-anoj prof. H a i n s c h e g g, E d e r kaj P o d r e p s c h e k, kiuj nek timis penon kaj tempon por tiom modele aranĝi nian jaran ĉefkunvenon. Dum la kortuŝaj adiaŭaj vortoj de la LKK-prezidanto, prof. Hainschegg, ĉe la kongresfiniĝo eĉ multaj okuloj de la aŭskultantoj malsekiĝis.

En plena harmonio kaj amikeco pasis la kongreso en Graz. Kaj ni jam nun alvokas vin: Venu certe al nia kvara kongreso, okazonta dum pentekostoj 1950 en Vieno! Logo.

Konciza organiza bilanco por 1948—1949

La detala financa raporto de la kasistino pri la pasinta periodo en la ĉefkunveno de AEF en Graz unuanime estis akceptata kaj laŭ la propono de la kontrolantoj la eksiĝanta estraro estis senŝarĝata. El la ampleksa raporto ni ekstraktis nur la ĉefajn kontojn.

Enspezoj		Elspezoj	
Saldo la 1. 8. 1948	ŝ 125.17	Luo, lumo, hejtado, telefono, salajroj	ŝ 5320.40
Kotizoj ĝis 31. 12 1948 kaj 1. 1.—30. 6. 1949	3109.80 6044.80	Ĝeneralaj spezoj	1805.52
Subvencioj por 1949	3500.—	Afranko	516.45
Donacoj kaj div. enspezoj	2508.35	Revuo, papero kaj presigo	6645.25
		Saldo la 30. 6. 1949	1000.50
Sumo	15.288.12	Sumo	15.288.12

Centra estraro de AEF

por la agadjaro 1949/50, elektita en la ĉefkunveno de AEF dum la Esperanto-Kongreso en Graz, la 19. 7. 1949.

Tiuj estraranoj, ĉe kies nomoj mankas la urba nomo inter krampoj estas el W i e n.

Honora Prezidanto: Sekcia ĉefo, ĝeneral-poŝtdirektoro d-ro Karl D w o r s c h a k.

Prezidanto: Eksministro d-ro Hans F r e n z e l.

Vicprezidantoj: Sekcia konsilanto d-ro Maximilian F ü h r i n g, Magistrata ĉefkonsilanto d-ro Leopold G r i m m e, advokato d-ro Adolf H a l b e d l (Knittelfeld).

Afergvidanto: Kalkul-sekretario Rajmund C e c h.

Kasistinoj: Maria L o i b e l, Auguste R o s c h e r.

Protokolantinoj: Maria Z a j i c e k, Marianne S c h u h.

Kontrolantoj: Alfred B e r d a n, Franz H a g e n, Franz B a u m g a r t i n g e r (Salzburg), Bruno S e i w a l d (Vorarlberg).

Arbitraciantoj: Direktoro Paul G l ü x m a n n, D-ro Adolf H a l b-

edl (Knittelfeld), Franz Ohrenberger, Franz Handler (Wr.-Neustadt), Hugo Kraus.

Redakcia komitato: D-ro Leopold Grimme, Ernst Werner, Hugo Kraus, Gustav Loibel.

Propagand-komitato: Gabriel Katzianka, Emil Vokal, Hans Steiner (Kirchbichl), Josef Eder (Graz).

Konsilantoj por instruaferoj: Profesoro Robert K. Frühmann, Fakinstruisto Franz Fötinger (Salzburg), Direktoro Franz Watzinger (Villach), Fakinstruisto Anton Konecny.

Landaj estroj: Vieno: Emil Vokal, Malsupra Aŭstrio: Johann Schwarz (Felixdorf), Supra Aŭstrio: Karl Nigl (Linz), Salzburg: Fakinstruisto Franz Fötinger (Salzburg), Tirolo-Vorarlberg: Hans Steiner (Kirchbichl), Stirio: D-ro Adolf Halbedl (Knittelfeld), Karintio: Karl Dürrschmid (Klagenfurt), Burgenland: Fakinstruisto Hans Bauer (Eisenstadt).

Sindikataj aferoj: Ferdinand Stöckl, Friedrich Mosek.

Reprezentantoj: U. E. A. — Magistro Franz Höfert, S. A. T. — Ludwig Sager, Esperanto-amikoj — Prof. d-ro Josef Görlich, Instruistoj — Franz Fötinger (Salzburg), Fervojistoj — Josef Zink, Poŝtistoj — Johann Janecka, Tramistoj — Hugo Braun, Katolikoj — Walter Mudrak, Socialistoj — Josef Slezak, Kommunistoj — Franz Haiderer, Naturamikoj — Max Finkenzeller, Infanaro — Rudolf Bouché, Junularo — Ferdinand Schorna, Alois Hilkersberger (Landeck).

Salutleteroj el tutmondo

venis al la LKK okaze de la Kongreso en Graz kaj AEF kore dankas al ĉiuj sendintoj, ĉu organizoj aŭ individuaj geesperantistoj, pro la elmontro de ilia simpatio. Pro la abundo de leteroj ni povas citi nur la devenlandojn:

Ameriko-Nord, Aŭstralio, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Grandbritujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Malajo, Nederlando, Nov-Zelando, Palestinio, Polujo, Portugalujo, Hispanujo, Svedlando, Svislando, Sud-Afriko.

Krome sendis afablajn salutleterojn ŝtat-prezidanto d-ro Karl Renner, aŭstriaj ministroj, altrangaj ŝtatfunkciuloj, universitataj profesoroj, sciencistoj kaj organizoj.

Kongresa saluto el Nord-Ameriko

El multaj salutleteroj alvenintaj al la nunjara aŭstria E-Kongreso en Graz ni publikigu nur unu gravan, ĉar por aperigi ankaŭ aliajn mankas la loko. La redakcio.

Estimataj Gesamideanoj! Observinte la progreson de la Esperanto-movado en via lando kun granda intereso kaj sincera admiro, mi permesas al mi sendi al la nunjara Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz la plej tutkorajn salutojn nome de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.

Ni scias pri la grava subteno, kiun Esperanto ricevas en via lando de la registaro kaj de multaj aŭtoritataj personoj, kaj ni gratulas vin precipe je la celkonscia subteno de la famkonata Generalpoŝtdirektoro d-ro Karl Dworschak. La apero de oficiala aŭstria poŝtmarko honore al Esperanto certe gajnos al via lando multe da amikoj en la tuta mondo.

Dezirante al la Kongreso en Graz plenan sukceson, mi certigas vin, ke ankaŭ en Usono kaj Kanado, kie la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (EANA) laboras, la uzo de Esperanto por internaciaj rilatoj konstante kreskas.

Samideane via
Dr. William Solzbacher, prezidanto de EANA.

Modela organiza laboro de LKK

La Loka Kongresa Komitato konsciiĝis, ke la kongreso en Graz devis superi la ĝis nun okazintajn kaj la publiko kaj gazetaro devis esti kaptataj de la esperantista aranĝo. Tial la LKK la 14. 7. 1949 okazigis gazetaran konferencon, kiun partoprenis reprezentantoj de ok gazetoj. Raportis prof. Hainschegg, J. Eder kaj A. Podrepschek. La rezulto estis, ke la tagĵurnaloj skribis pri la E-kongreso kaj ankaŭ estonte akceptos komunikojn pri Esperanto.

Danke ni devas substreki la gravan financan helpon, kiun ricevis la LKK de diversaj institucioj. Donacis por la kongreso la Landa Registaro ŝ 3000.—, la urbo Graz ŝ 2000.—, la Laborista ĉambro ŝ 1500.— kaj la Landa Fremdultrafika Oficejo proprakoste presigis kongresprospekton kaj elspezis por tio ŝ 1330.—.

La Landa Biblioteko disponigis belegan ĉambregon por la E-ekspozicio kaj la urbestro por la LKK disponigis en la urbdomo grandan ĉambron kun telefono kiel kongresoficejon.

De sur la urbdomo dum la kongreso flirtis 7 m longa E-flago, aliaj grandaj flagoj ornamis la Laboristan Ĉambron kaj la Landan Bibliotekon. Eĉ sur la tramvagonoj flirtetis flagetoj. Mil malgrandaj kaj mil

grandaj dukolaraj afiŝoj dissenditaj tra tuta Aŭstrio atentigis de la muroj kaj en diversaj ejoj la publikon pri la okazo de la Aŭstria E-Kongreso en Graz. Lernejestro Erwin Schrotter liveris la artan desegnon por la speciala poŝtstampo kaj tiamaniere multe kontribuis al la kongresa sukceso.

Komence la LKK povis kalkuli je proksimume 800 kongresanoj. Sed bedaŭrinde la 1. Junio okazis multaj prezo- kaj tarif-plialtigoj sekve de nova salajro-prezo-kontrakto kaj tial multaj geesperantistoj pro financaj kaŭzoj ne povis partopreni.

La kongreso povis saluti krom multaj enlandaj eminentuloj kaj aŭtoritatuloj 46 eksterlandajn gastojn, kiuj estis forte impresataj pro la bonega aranĝo kaj varia programo. Tial inter ili naskiĝis la ideo aranĝi la Universalan E-Kongreson en 1951 aŭ 1952 en Graz, la urbo kiu pruvis, ke ĝi povus akcepti kaj oportune gastigi eĉ 5000 kongresanojn el tutmondo. En ĉefurbo de provinclando tia kongreso eĉ multe pli efikus ol en grandurbo, kie la publiko kutimiĝis internacian vivon.

La LKK de Graz, kiu la ĉijaran kongreson tiel lerte aranĝis, do estus preta akcepti la komision fari la antaŭpreparajn laborojn por Universala Kongreso en Graz kun ĝiaj belaj ĝardenoj, proksimaj arbaroj kaj montoj, kiuj logus multajn kongresanojn al posta feria restado.

Plenan rekonon kaj dankon meritas la gvidaj personoj de la LKK kaj ĝia helpa stabo. La tuta respondeco por la sukceso de la kongreso estis unuavice ĉe la s-anoj profesoro Hainschegg, afergvidanto Josef Eder, kiu speciale oferis multan liberan tempon por la afero, d-ro A. Halbedl kaj A. Podrepschek.

Ili fervore estis helpataj de la gesinjoroj Arch, Marco, Rath, Russheim, Schrotter, Silli, Skasa, Tinnacher kaj Zimmermann. Ankaŭ al ili ni esprimas nian koran dankon.

La sukceso de la kongreso do estas la rezulto de la harmonia kunlaboro kaj optimismo de la ges-anoj en Graz, kiuj donis al ni modelan ekzemplon por la aranĝo de la sekvontjara kongreso en Wien.

Danaj gesamideanoj vizitis Austrion

Per aparta aŭtobuso 32 danaj ges-anoj vizitis Aŭstrion kaj almenaŭ la lastan tagon de la aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz ili povis partopreni por viziti la faman Lur-groton kaj kun iom da peno surgrimpi la Schlossberg en Graz. Krome ili entreprenis rondvojaĝon sur la Packstrato, aŭtovojo en la belega montegara regiono de Stirio. Trans la mondfama refreŝiga loko Semmering ili venis ankaŭ Vienon kaj inter alie estis afable akceptataj de la urbestro de Vieno, eksgene-

ralo d-ro Th. K ö r n e r en la urbdomo. En la E-grupo „Harmonio“ okazis salutvespero por niaj danaj gastoj. La mallongan tempon, kiun ili povis resti inter ni, ili ankaŭ uzis por viziti la Strauss-ekspozicion kaj la iaman imperiestran kastelon Schönbrunn.

La lasta celo estis la konata Viena ekskursejo sur Kahlenberg. Sur la bela altaĵŝoseo aŭtobuso venigis la gastojn sur la monton kaj de la hotela teraso ili ĝuis unikan perspektivon al Vieno. Viena muziko, vienaj poemaĵoj kaj adiaŭaj vortoj okazis en la spegulsalono de la hotelo, kie ni al niaj karaj ges-anoj post kelkaj mallongaj horoj devis diri: ĝis revido! Niaj danaj gastoj havis ion komunan kun la Vienanoj: ili volonte kantis kaj per siaj gajaj kantoj ili konkeris niajn korojn.

Trans Linz, Salzburg ili veturis al Ebensee, suriris tie per la kablofervojo la belegan montegon Feuerkogel kaj poste ili vizitis Kufstein, la belegan urbeton en la regiono de la Kaiser-montaro antaŭ ol ili forlasis la limon de Aŭstrio. Amikaj interrilatoj ekkomenciĝis kaj ni tenos niajn karajn danajn samcelanojn en bona, afabla memoro.

Logo.

ESPERANTO-MOVADO *en Aŭstrio*

Rudolf Michael Frey †

Malnova, senlaca pioniro de la aŭstria kaj internacia E-movado, entuziasma propagandisto de la ideo de lingvo internacia, varma amiko al multaj geesperantistoj en- kaj eksterlande, ne plu vivas inter ni: la neelpetebla morto prenis la 14. 7. 1949 post longa, grava malsano nian s-anon Rudolf M. F r e y tro frue el niaj vicoj.

Naskita la 1. 2. 1885 en Wien, s-ano Frey faris ĉi tie siajn gimnaziajn studojn kaj akiris la ateston pri sukcesplena abiturienta ekzameno. Kiel juna oficisto li unue venis en la servon de la Landa Registaro de Malsupra Aŭstrio kaj post kelka tempo li akceptis postenon kiel oficisto de la magistrato de la urbo Vieno kaj akiris la rangon de kalkul-konsilanto. En 1919 li konatiĝis kun Esperanto kaj fariĝis entuziasma adepto de ĝi. Li estis kunfondinto kaj aktiva kunlaboranto en la tiama E-societo de la komunumaj dungitoj.

En 1931 s-ano Frey pro malsano kaj por povi pli intense labori por la E-movado petis esti pensiita por du jaroj, kion la magistrato konsentis. Sed tiu templimigita eksiĝo el la aktiva servo pli poste pro personara superstato estis ŝanĝata sen la volo de s-ano Frey en daŭran pension. Tiamaniere pro sia aktiva okupiĝo pri Esperanto li en relative junaj jaroj estis antaŭtempe pensiita kaj suferis daŭran financan malprofiton. Aliflanke s-ano Frey nun havis sufiĉe da tempo povi sin ĉiuforte dediĉi al la E-movado en Aŭstrio kaj eĉ en eksterlando. Jam en 1930 li entreprenis Esperanto-lumbild- kaj filmpropagand- voja-

ĝon tra la skandinaviaj ŝtatoj, Esperantlingve varbante por Aŭstrio kaj Vieno.

Sennombraj estas la E-kursoj, kiujn li aŭ iniciatis aŭ mem gvidis en sia entuziasmiga maniero. Oni devus citi longan liston de gravaj funkcioj, kiujn s-ano Frey okupis en sia longa esperantista vivo. Kie okazis gravaj aranĝoj ĉu en- aŭ eksterlande, R. M. Frey certe ĉeestis kaj kunagadis aktive. Kaj kiel fajre li povis paroli kaj pledi por Esperanto. La 32a U. K. en Bern estis la lasta eksterlanda kongreso, kiun li povis viziti. Estante jam sufiĉe malsana li tamen partoprenis la internacian fervojistan renkontiĝon en Vieno komence de Aprilo. Li mankis en neniu kunsido de AEF, kies agema estrarano li estis, tiom longe kiom fortoj permesis al li partopreni en ĉiuj branĉoj de la movado. Kie estis enfluhavaj personoj varbotaj por la ideo de Esperanto, tie certe kalkul-konsilanto Frey estis la ĝusta homo por konvinki ilin pri la utileco de la lingvo kaj akiri almenaŭ ilian simpation por Esperanto. Tiel li ankaŭ depost du jaroj estis la plej grava konsilanto de la aŭstria ĝeneral-poŝtdirektoro en Esperantaj aferoj; kun la eldono de la aŭstria E-poŝtmarko estas honore interligitaj la nomoj de d-ro Karl Dworschak kaj R. M. Frey.

Kaj ĉiu el ni havis la konvinkon, ke li agadis por la movado ne por havigi al si rangon aŭ profiton, sed ke lia entuziasmo por Esperanto fluis el pura koro, el profunda konvinkiĝo, kvankam ni kelkfoje ankaŭ devis kritiki la manierojn de lia propagando. Li ardis pro la afero kaj tial ŝajnis al li ĉiuj metodoj aplikeblaj kaj ni devas konfesi, ke li alportis por la ĝenerala E-movado multajn sukcesojn. Tial s-ano Frey havis multajn amikojn en ĉiuj ideaj grupoj de AEF, en la katolika, laborista kaj neŭtrala.

Kiam en 1934 la impona aŭstria laborista E-movado detruiĝis pro la politikaj okazintaĵoj, R. M. Frey el la neŭtrala E-movado estis la unua, kiu ekkonis la gravan mankon de la laboristaj esperantistoj en la ĝenerala movado kaj serĉis amikan kontakton kun la pli poste fondita AEF, en kiu denove kolektiĝis la laboristaj esperantistoj. La 25. 5. 1937 povis esti subskribata kontrakto inter la tiam ekzistantaj AEA kaj AEF pri komuna kunlaboro, kiu fruktodona kunagado en Marto 1938 denove estis interrompata.

Kiam ni en 1945 rekonstruis nian aŭstrian E-movadon, R. M. Frey apartenis al tiuj, kiuj senrezerve pledis por unueca kunlaboro de ĉiuj aŭstriaj geesperantistoj en la kadro de AEF kiel sola landa E-organizo de Aŭstrio.

Sed la nomo Frey ne nur estas konata en la esperantistaj rondoj de Aŭstrio, sed ankaŭ en la vasta eksterlando. Li aperigis multajn artikolojn kaj notojn en la internaciaj E-gazetoj kaj dissendis eĉ proprakoste multajn informcirkulerojn tra la tuta mondo. La lasta estis tiu de Junio 1949, en kiu li i. a. esprimis „Adiaŭan Saluton' de sia esperantista agado.

Estante jam mortmalsana, s-ano Frey ankoraŭ interesiĝis pri E-aferoj kaj eĉ unu tagon antaŭ sia morto li telefone parolis pere de sia edzino kun la redaktoro de AER pri la kongreso en Graz. Kaj dum kongresis la aŭstria esperantistaro en Graz, parto de la Vienaj ges-anoj akompanis la 19. 7. 1949 la mortintan s-anon Frey sur lia lasta vojo en la centra tombejo de Vieno. Grandaj florkronoj nome de AEF kaj de la poŝtista E-grupo esprimis la lastajn salutojn de la aŭstria esperantistaro. Vic-prez. de AEF, direktoro Paul Glüxmann faris nekrologon ĉe la tombo, dankante al s-ano Frey pro ĉiuj laboroj kaj personaj oferoj, kiujn li prenis sur sin por la venko de Esperanto.

Sed dankante al nia mortinta s-ano, ni kompate ankaŭ pensas al lia kara edzino, s-rino Maria Frey, kiu tiom ofte devis rezigni trankvilan familian vivon, ĉar la E-movado tiel plene okupis ŝian edzon, kiun ŝi dum lia malsano zorge kaj kun granda pacienco flegis ĝis la lasta minuto. Pro ĉio ĉi ni es-

primu al s-rino Frey nian plej koran kaj plej profundan dankon.

En s-ano Frey ni perdis unu el niaj plej viglaj, plej aktivaj kaj al la afero Esperanto plej sindonaj s-anoj. Sed lia nomo, liaj laboroj kaj sukcesoj restos engravuritaj en la historio de la E-movado kaj li ĉiam restos imitinda modelo por ni kaj niaj posteuloj. Post lia laborriĉa 30 jara Esperanto-vivo li ripozu en paco! Kun la eterna lumo hele lumu al li ankaŭ la brilo de la verda stelo de Esperanto!

Aŭstria Esperanto-poŝtmarko gravega sukceso

Kion ni jam antaŭe sciis, ke la eldono de la bela verda Esperanto-poŝtmarko estos bonega en- kaj eksterlanda atentigilo pri Esperanto, tio centprocente efektiviĝis.

Kiam la marko la 25 an de Junio la unuan fojon oficiale estis eldonita ĉe la ĉefpoŝtoficejo en Vieno, stampita per speciala „Unuataga Stampo", miloj da homoj pacience atendis vice en kaj ekster la oficejo por akiri Esperanto-poŝtmarkojn kun la menciita stampo. Kaj la ceteraj Vienaj poŝtoficejoj ricevis tro malgrandan provizon por povi plenumi ĉiujn dezirojn de la publiko rilate al nombro dum la unuaj tagoj.

La LKK de la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz sole petis de la poŝtadministracio 20.000 Esperanto-poŝtmarkojn por la speciala kongresa poŝtoficejo, kiuj markoj preskaŭ ĉiuj vendiĝis. La tuta eldonkvanto de la Esperantomarko estas unu miliono da pecoj.

De la eksterlando venis al la Esperanto-centro multaj leteroj kun respondkuponoj kaj la peto sendi koverton afrankitan per la aŭstria Esperantomarko. Centoj da leteroj kaj kartoj venis al la Esperanto-sekcio de la Aŭstria Trafikoficejo (Wien I., Friedrichstraße 7), ĉar la petintoj ricevis belan prospekton pri Aŭstrio afrankitan per la marko kun la verda stelo. Tiamaniere jam svarmis kaj ankoraŭ svarmas multmiloj da Esperanto-poŝtmarkoj tra la tuta mondo, atentigante, ke Aŭstrio oficiale subtenis la ideon pri popola interkompreniĝado.

Interesa por niaj eksterlandaj gesanoj certe estas, ke la aŭstria poŝtadministracio okaze de la apero de la E-poŝtmarko eĉ eldonis presitajn foliojn kun klariga teksto pri la celoj de Esperanto, haveblajn por ĉiu kliento en ĉiuj aŭstriaj poŝtoficejoj. El la germanlingva teksto ni ekstraktu nur kelkajn interesajn frazojn:

„Tra jarcentoj sufiĉis en la internacia vojaĝtrafiko krom la franca lingvo — la lingvo de la diplomatoj — la scio de la germana lingvo, almenaŭ sur la eŭropa kontinento. Sed de kiam la modernaj trafikiloj kiel fervojo, aŭto kaj aviadilo, plue telegrafo, telefono kaj radio la homojn alproksimigis, iĝas la problemo pri forigo de la lingva haoso pli aktuala de jaro al jaro...

Dum la nacisocialista reĝimo malpermesita, la mondlingvo de post 1945 tamen ankaŭ ĉi tie jam regajnis multajn adeptojn, precipe tial, ĉar la radio esence kontribuas je la disvastigo de la kono pri Esperanto en vastaj rondoj de la publiko... La aŭstria poŝtadministracio, de ĉiam la kompetenta interligilo inter Aŭstrio kaj la mondo, intencas per la eldono de Esperanto-poŝtmarko ankaŭ siavice varbi por paca interproksimiĝo de la popoloj."

Okaze al la apero de la Esperanto-poŝtmarko faris la ĝenerala poŝtdirektoro d-ro Karl Dworschak la 21. 5. 1949 paroladon en radio Wien- en kiu li inter alie diris:

„La homaro sopiras daŭran pacon, sed ankaŭ komunan lingvon por reciproka interkompreniĝo... Al la paco kaj popola alproksimiĝo volas servi ankaŭ la lingvo Esperanto. Nia registaro kaj la registaroj de aliaj ŝtatoj jam plurfoje deklaris akceli tiujn strebadojn.

Plia kontribuaĵo al la akcelo de la pacaj celoj flanke de nia ŝtato estas la eldono de Esperanto-poŝtmarko okaze de la ĉijara Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz... La verda Esperanto-stelo — kiel simbolo de la paco — alprok-

simigu nian Aŭstrion al ĉiuj popoloj de la mondo!"

La membrokotizo por AEF

Laŭ la decido de la ĝenerala kunveno de Aŭstria Esperantista Federacio en Graz, la kotizo por AEF restos la sama kiel ĝis nun.

Plenpagantaj membroj pagas monate al la grupo ŝ 2.— kaj ricevas senkoste la organon Aŭstria Esperanto-Revuo. Familianoj, senlaboruloj kaj ges-anoj kun malalta rentumo pagas monate nur ŝ 1.—, sed ne povas ricevi la organon pro la troaj kostoj. La duono de la nomitaj kotizoj restas en la grupoj por ties elspezoj, la alian duonon la grupoj pagas al la centro.

La membroj estas petataj regule pagi sian monatan kotizon al la grupo kaj la grupkasistoj regule sendu la enspezitajn kotizojn al la centro, por ke la organizo povu kovri la altajn kostojn de la organo kaj plenumi la ceterajn taskojn de la Esperanto-movado.

Estroj de la landaj AEF-organizoj

Burgenland: Hans Bauer, fakinstruisto, Eisenstadt, Hauptstr. 19. **Kärnten:** Karl Dürrschmid, librovendisto, Klagenfurt, Sternallee 5. **Niederösterreich:** Johann Schwarz, oficisto, Felixdorf, Bräulichgasse 12. **Oberösterreich:** Karl Niggl, oficisto, Linz a. d. Donau, Prinz Eugenstr. 11. **Salzburg:** Franz Fötinger, instruisto, Salzburg, Kasernengasse 5. **Steiermark:** Dr. Adolf Halbedl, advokato, Knittelfeld, Schmittgasse 15. **Tirol-Vorarlberg:** Hans Steiner, oficisto, Kirchbichl, Grattenbrücke 1, Tirol. **Wien:** Emil Vokal, Wien I., Neutorgasse 9.

Dezirante informojn pri vialandaj Esperanto-aferoj, bonvolu vin turni al la respektiva landestro de AEF. (Por skribaj informoj aldonu reafrankon.)

E-societo Wiener Neustadt

refondita en Septembro 1948 daŭrigas persisteme sian malfacilan laboron por Esperanto en tiu ĉi plej detruita de la milito urbo de Aŭstrio.

La grupo regule kunvenas ĉiumerkrede de la 19.30 — 21.30 h. en la domo de la Socialista partio, Wiener Neustadt, Wienerstr. 12, la etaĝo. La iama modela biblioteko, kiu nombris centojn da libroj, estis detruitaj de la bomboj. Tamen jam sukcesis instali novan biblioteketon fervore legata de la grupanoj.

Okaze de E-renkontiĝoj en Schlaining, Mattersburg, St. Pölten kaj internacia fervojista renkontiĝo en Wien, la grupo estis reprezentata de pluraj membroj. Du anoj faris la ŝtatan E-ekzamenon.

Grupa korespondadreso: Gustav Schmid, oficisto, Wr. Neustadt, N.-Ö., Wöllersdorferstr. 25/II/6.

Viena Esperanto-Delegitaro (VED)

Por povi pli intense agadi por la disvastigo de Esperanto en la nuna malfacila periodo, VED bezonas financan helpon flanke de la esperantistaro. Per unufoja pago de ŝil. 9.— vi povas fariĝi Akcelanto de VED, kaj unufoje pagante pli ol ŝil. 10.— vi fariĝos Subtenanto de VED. Informu ankaŭ viajn grupanojn pri tio kaj instigu ilin subteni VED per la indikita aliĝo.

Kiuj jam ricevis poŝtpagilon, bonvolu plej baldaŭ enpagi sian elektitan kotizon. Aniĝojn kaj kotizojn por VED akceptas la E-Centro, Wien, I., Neutorgasse 9.

Societo de Amikoj al Esperanto

Post ioma ripozo en la agado de la nomita societo, ĝi nun denove ekprenas la varbadon por Esperanto inter la neesperantista publiko.

La societo ne serĉas unuavice membrojn inter la esperantistaro mem — kvankam ili volonte estas akceptataj — sed inter la amaso da personoj, kiuj simpatias la lingvon internacian, sed ne emas lerni ĝin. Tamen multaj geesperantistoj en ĉiuj federaciaj landoj povus helpi en la varbado de novaj amikoj al Esperanto, kiuj pagos jaran kotizon de nur ŝil. 2.—. Bonvolu informi pri tio viajn grupanojn, geamikojn kaj geko-

natojn aŭ petu informojn de Österreichische Gesellschaft der Freunde des Esperanto, Wien I., Neutorgasse 9, kontraŭ reafranko.

Dum la E-Kongreso en Graz pli ol 50 membroj de la societo Amikoj al Esperanto kunvenis por pritrakti la aktiviĝon de la organizo, kiu devus fariĝi amas-movado de simpatiantoj al Esperanto. Esperantistoj, varbintaj 4 novajn amikojn al Esperanto, mem fariĝas aktivaj membroj sen pagi kotizon. Varbiloj kaj enkasigiloj estas haveblaj ĉe la supre indikita adreso.

E-fakgrupo de la poŝt- kaj telegrafistoj

Ĉiuj poŝt- kaj telegrafistoj esperantistaj el Aŭstrio anoncu sian aliĝon al la fakgrupo kiel aktivaj membroj. En aliaj distriktaj aŭ lokaj grupoj ili kunlaboru nur kiel subtenantaj anoj, por ke ne estiĝu duobla membreco. Viajn lingvajn aferojn reprezentu ĉiurilate nur via fakgrupo. Laŭdezire ni sendos al vi aliĝdeklaron. Atentigu ĉiuloke la esperantistajn PTT-istojn pri la fakgrupo kaj instigu ilin al membriĝo.

Laŭbezone estas aranĝataj porkomencantaj aŭ porprogresintaj E-kursoj. Skriba kurso por la provinca kolegaro estas en preparo. Per Esperanto ni celas atingi kontakton kun PTT-istoj ĉiulande, reciprokan ferian restadon, eventuale gastigadon de esperantistaj infanoj ĉe esperantistaj PTT-istoj diverslande.

La sidejo de la fakgrupo estas Wien I., Postgasse 8. Grupkunvenoj okazas ĉiun duan kaj estrarkunsido ĉiun trian ĵaŭdon en la monato je la 18.00 h.

Gis nun aliĝis kolegoj el jenaj lokoj: Liezen kaj Hartberg (Stm.), Bad Ischl, Mondsee, Grieskirchen (O.-Ö.), Felixdorf, Göstling a. d. Ybbs (N.-Ö), Innsbruck (Tirol).

„La Interligilo" informas la trafikoficistaron tutmonde pri metiaj kaj teknikaj aferoj. La PTT-istoj estas petataj aliĝi al la Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomuniko kaj Transporto, kiu en Aŭstrio estas reprezentata (skribaj informoj nur kontraŭ reafranko!) de la ĉefdelegito de ILEPTT s-ano Johann Janecka, Diemgasse 3, Wien XIX., Aŭstrio.

E-societo „Danubio"-Wien

konstante aktive laboras por pligrandigi sian anaron kaj eduki por la movado novajn kunlaborantojn. La kunvenoj somere kaj aŭtune okazas ĉiun duan kaj kvaran lundon en la monato je la 18.30 h en la gastejo Zboril, Wien VII., Sigmundgasse 14. Ĉiuj anoj kaj gastoj el aliaj grupoj estas petataj regule viziti la societkunvenojn, dum kiuj ĉiam okazas aktuala E-programo. La societa „Franz Vasta-biblioteko" nombras 500 librojn, rekomendindajn al ĉiuj anoj kaj amikoj. La „Danubio"-Informilo aperas dumonate kaj enhavas la programojn de la societkunvenoj kaj aliajn aktualajn informojn.

UEA- kaj SAT-Kongresoj

okazis en Aŭgusto, sed pri ĉi tiuj du gravaj aranĝoj de esperantistoj el tutmondo pro tro frua redaktfino de la Revuo raportoj povos aperi nur en la sekvonta numero.

Junulargvidantoj de Tirolo por Esperanto

Kun ĝojo ni povas konstati en Aŭstrio, ke la simpatio al Esperanto kreskas ĉiam pli en rondoj de aŭtoritatuloj kaj diversaj respondaj funkciuloj de la publika vivo. Ni hodiaŭ aperigas interesajn ekstraktojn el leteroj de junularaj funkciuloj el Tirolo.

Redaktoro Rolf Hauser-Hauzwicka skribis en letero de 14. 6. 1949 al la AEF-Landestro de Tirol. Hans Steiner, inter alie jenon:

„En nia eduka laboro dum la nova lernjaro ni volas ankaŭ pli konsideri Esperanton, ĉar ĝuste tiu ĉi artlingvo estas bonege taŭga efiki popolojn interliganta.

En la 4. Kongreso de la Austria Junulara Ruĝkruco fine de Julio mi intencas entrepreni tiurilatan paŝon... Estante redaktoro de la „Arbeitsblätter für Erzieher", de la „Tiroler Mitteilungsblatt" de la junulargazetoj „Berglandkinder"

kaj „Jungösterreich“, mi nature ankaŭ havos okazon raporti en la nomitaj aperaĵoj pri Esperanto, eventuale eĉ publikigi Esperanto-angulon aŭ Esperanto-kurson.

S-ro sekcia konsilanto d-ro M. F ü h r i n g, la prezidanto de la Aŭstria Junulara Ruĝkruco, ja mem estas esperantisto kaj pro tio mi opinias, ke ni trovas en nia organizo bonan grundon por Esperanto. Kaj kial ĉi tiu paŝo ne ankaŭ eliru el Tirol kiel jam multaj aliaj ...“

S-ro Putzger, gvidanto de la laborkomunumo „Jugendwandern und Jugendreisen“ ĉe la Landa Junular-referato de Tirol, skribis en letero de 20. 6. 1949 al s-ano Hans Steiner jenon:

„Kiel vi povis vidi el nia programo, estas la ĉefcelo de ĉiuj niaj aranĝoj tio, la junularojn de ĉiuj landoj kunigi, por inter ili akceli la reciprokan interkompreniĝon.

En kelkaj interesaj interparoloj ni konstatis, ke Esperanto tre esence povus subteni nin en niaj tiurilataj klopodoj kaj proponis eventuale eldoni niajn programojn kaj komunikojn ankaŭ en Esperanto kaj aranĝi niajn junularajn renkontiĝojn parte en Esperanto ...“

Tirol konstante aktiva

Okaze de distrikta porinstruista konferenco en Kufstein, s-ano H. Steiner disdonis flugfoliojn, petante per ili la geinstruistojn pri aktiva partopreno en la E-movado. — La polica direkcio de Innsbruck promesis novan E-kurson ĉe sufiĉa intereso. — En Kufstein kaj Wörgl alfiksiĝis montrokestoj por Esperanto ĉe frekventataj lokoj. — En la ĉeflernejo de Jenbach estas preparata E-kurso por la lernantoj. — Fine de E-kurso en la popollernejo de Kirchbichl estis disdonataj premioj por la plej bonaj lernantoj. La plej juna, lernanto de la 2. klaso, Hans K r o i s, ricevis la unuan premion. — Esperanto-Servotabuloj nun estas fiksitaj en jenaj fervoj-stacidomoj: Solbad Hall, Jenbach, Kirchbichl kaj Lauterbach. — La landa lernejkonsilantaro permesis la verbadon por Esperanto en la mezlernejoj de Innsbruck.

Tirol varbas ankaŭ per Esperanto

Krom la jam pli frue eldonitaj bele ilustritaj E-prospektoj „Tirol en somero“, „Tirol en vintro“, „Tirol — Aŭstrio“, „Innsbruck — Tirol“, kaj „Igls — Tirol“, la landa Trafik-oficejo ankaŭ presigis grandajn varbafiŝojn kun fotobildo pri „Karwendel-montaro“ kun E-teksto.

Per tio Tirol kunmarŝas ĉe la supro de tiuj landoj, kiuj jam uzas Esperanton en la turisma propagando.

„Österreichisches Jugendrotkreuz“

(Arbeitsblätter für Erzieher) — „Aŭstria Junulara Ruĝkruco“, organo por edukistoj — aperigis en n-ro 4/1949 germanlingvan alvokon al la instruistaro pri studado de Esperanto kaj instruado de ĝi en la lernejoj, verkita de ĉeinstruisto Fritz S c h m i d, Fieberbrunn, Tirol.

2. Esperanto-Tago en Steiermark

La dua landa E-Tago okazis la 23. — 24. 4. 1949 en Leoben. Partoprenis ĝin ges-anoj el Graz, Donawitz, Vordernberg, Zeltweg, Knittelfeld, Mautern, Gr.-Veitsch kaj Leoben.

Prof. H a i n s c h e g g faris interesan kaj multe aplaŭditan paroladon pri „De prasono al mondlingvo“. Dum la cetera tagordo sekvis raportoj de la AEF-landestro d-ro A. H a l b e d l kaj de diversaj lokaj delegitoj. La kunvenon finis migrado sur la Baumgartner Kogel ĉe bela vetero.

La AEF-landestro por Steiermark d-ro Halbedl alvokis la geesperantistojn apogi lin en la klopodado pri starigo de E-Lektorato en la universitato de Graz. La landaj gazetoj estu bombardataj per leteroj pri aperigo de artikoloj favoraj al Esperanto.

Kie kunvenas la esperantistoj en Steiermark?

E-societo „U n u e c o“, G r a z —

Adreso: A. Podrepschek, Graz, Sackstr. 16/I. Grupvespero: ĉiulunde de 20 — 22 Stempferg. 6/I.

E-Klubo „Kuraĝo", Leoben — Adreso: Franz Schick, Leoben-Göß, Hauptstr. 7. Grupvespero: ĉiumerkrede de 20 — 21.30 en la Laborista ĉambro, II.

E-grupo „Verda Stelo", Voitsberg-Köflach — Adreso: Hans Wakonigg, Volksschule Köflach. Grupvespero: ĉiulunde kaj ĉiumerkrede de 20 — 21 en la popollernejo.

E-rondo Knittelfeld provizore kunvenas ĉiumerkrede en la gastejo Ciftĉek en Knittelfeld.

Esperanto-Tago en St. Pölten

La 22. 5. 1949 okazis en la kunvenejo de la fabriko Voith la 1. Esperanto-Tago de Malsupra Aŭstrio, kiun partoprenis ĉ. 90 personoj el St. Pölten, Wr. Neustadt, Felixdorf, Pöchlarn, Krems, Hohenberg, Ob.-Grafendorf kaj Wien.

Estro Feilbacher salutis la partoprenantojn kaj s-ano Balague nome de la E-grupo „Voith". AEF-vicprez. direktoro P. Glüxmann faris paroladon pri „La mondo kaj Esperanto". Prof. d-ro H. Sirk parolis pri „Esperanto kaj la scienco". Plue sekvis raportoj de s-anoj J. Schwarz (AEF-landa org. de N.-Ö.), Feilbacher (St. Pölten), Mudrak (katolikoj), Haiderer (laboristoj), M. Finkenzeller („Naturamikoj"). Schmid (Wr. Neustadt), Cech (Amikoj de Esperanto), Vokal (Viena E-Delegitaro). E-ekspozicion aranĝis s-ano G. Katzianka.

Poste sekvis vizito de diversaj socialaj instalaĵoj porlaboristaj de la fabriko Voith. La E-Tago finiĝis per gaja kunestado de la partoprenantoj ĝis la hejmenveturado.

E-grupo „Paca vilaĝo" (Oftering)

fondita la 26. 9. 1948 nun nombras jam 13 anojn kaj kunvenas regule ĉiumerkrede je la 20.00 h. en la gastejo Danhofer en Freiling. Pasintaŭtune aranĝiĝis kurso, kiu finiĝis en Majo ĉi. Eĉ biblioteketon la grupo jam posedas. Grupano J. Wieshofer faris en Majo la ŝtatan E-ekzamenon kun distingo. Ankaŭ teatraĵon la grupo aranĝis dum la karnavalo. La propagandlaboro estas daŭrigata laŭcirkonstance. Adreso: Oftering 37, O.-Ö.

UEA — anoj

aranĝis dum la Aŭstria E-Kongreso la 16. 7. 1949 fakkunsidon. Prezidis la UEA-ĉefdelegito por Aŭstrio s-ano magistro Franz Höfert (Wien XIV., Penzingerstr. 121). Partoprenis 40 ges-anoj el ĉiuj liglandoj. Estis decidata instigi la AEF-anojn aliĝi ankaŭ al UEA kaj pli densigi la reton de la UEA-delegitoj en Aŭstrio. Jarkotizo al UEA estas ŝ 10.— por simpla membro. Membroj-abonantoj ricevantaj la revuon „Esperanto" pagas jare ŝ 25.—. La AEF-grupoj estas petataj aliĝigi siajn anojn almenaŭ kiel kolektivaj UEA-membroj per pago de nura jarkotizo de ŝ 1.— Informojn pli detalajn pri UEA vi povas peti de la ĉefdelegito (vidu pli supre) kontraŭ aldono de konforma reafranko.

Aŭstria Esperanto-Servo

Aŭstrio post la malfacilaĵoj de la pasinta milito denove fariĝis lando por turistoj, kaj multaj vojaĝemuloj — inter ili certe ankaŭ geesperantistoj — vizitos nian belan hejmlandon. Tial la kreita E-Servo sub la estrado de ĝia direktoro, s-ano R. Cech, serĉas kunhelpantojn en ĉiuj lokoj de Aŭstrio.

Ges-anoj, emantaj transpreni la funkcion de loka delegito kaj kiuj sufiĉe bone regas Esperanton, estas petataj anonci sin ĉe: Aŭstria E-Servo, Wien I., Neutorgasse 9.

Landa organizo de AEF por Malsupra Aŭstrio

Ĉiuj grupoj kaj izolaj membroj de AEF en Malsupra Aŭstrio estas petataj tuj kontaktiĝi kun la AEF-Landestro por tiu ĉi federacia lando pro starigo de firma organizo kaj reciproka apogo en la propagando por Esperanto. Informojn petu de la landestro s-ano Joh. Schwarz, Felixdorf, Bräunlichg. 12, N.-Ö.

Informojn pri E-aferoj en la teritorio de St. Pölten donas la estro de la E-grupo St. Pölten, s-ano Franz Marauschek, Mariazellerstr. 34 a. Por skribaj informoj bonvolu ĉiam aldoni reafrankon!

E-sekcio de la Aŭstria Trafikoficejo

kies starigon ni anoncis en AER n-ro 5-6/1949 kaj per specialaj cirkuleroj dissenditaj tra tutmondo estas grava sukceso. El diversaj landoj jam alvenis al la trafikoficejo pli ol 400 skribaĵoj.

La trafikoficejo nun jam preparas vintrosportajn aranĝojn en la plej belaj regionoj de Aŭstrio, disponigas sin por prizorgado de hoteloj, skilernejoj k. s. kaj dissendos tiucelajn prospektojn. Kontaktu pro informoj kun la Aŭstria Trafikoficejo, Esperanto-sekcio, Friedrichstr. 7, Wien I., Aŭstrio.

Landesfremdenverkehrsamt für Steiermark

(Landa Turista Oficejo por Stirio) en Graz, Herrengasse 16, nun aplikas en sia korespondado eksterlanda ankaŭ Esperanton, kion ni ĝoje diskonigas. Referanto de la oficejo por Esperanto estas nia plej aktiva s-ano Josef Eder.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien

sub la gvidado de sia fondinto kaj longjara direktoro kortega konsilanto Hugo Steiner, alvokas la geesperantistojn pri kunlaboro kaj aliĝo por akceli kaj plukonstrui ĉi tiun unikan instituton en la mondo. Jara kotizo estas nur aŭstr. šil. 3.—. Informojn kontraŭ reafranko petu de Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I., Hofburg, Batthyanistiege, 3. Stock.

Historio de la mondlingva ideo

estas la temo de pluraj paroladoj, kiujn faros (germanlingve) s-ano prof. d-ro J. E. Görlich je la 27. 9. 1949 kajsekvantaj mardoj de la 19.00 — 20.00 h. en la Popola Altlernejo Wien V., Stöbergasse 11.

Ges-anoj partoprenu multnombre ĉi tiujn tre interesajn paroladojn kaj varbu inter viaj konatoj por partopreno.

Ni refoje devas atentigi, ke ĉiuj organoj de AEF (Centro, E-Instituto, E-Servo, Redakcio de AER) ne povas respondi leterojn kaj aliajn skribaĵojn, se ne estas almetita la konforma reafranko.

Pripensu, ke la Centro por unu membrokotizo ricevas monate nur š 1.— kaj la afranko de simpla letero enlanda kostas 60 g, por eksterlando eĉ š 1.—.

Tial ne opiniu estonte, ke estas malemo por plenumi vian deziron aŭ malafableco, kiam vi ne ricevos respondon, se vi forgesis almeti reafrankon en via letero.

„Der Eisenbahner" (La fervojisto)

centra organo de la fervojista sindikato en Aŭstrio, aperigis en sia numero de Junio sufiĉe longan artikolon en Esperanto pri la IFEF-Kongreso en Aarhus, kiun partoprenis fervojistaj delegitoj el 8 landoj.

Esperantotago en Mattersburg

La Viena E-Delegitaro aranĝis la 24. 4. 1949 ekskurson en la burgenlandan urbeton Mattersburg, kie la partoprenintoj afable estis akceptataj de la tieaj ges-anoj kune kun la s-anoj el Eisenstadt, Oberpullendorf kaj Sauerbrunn. Okazis mallonga kunsido en la kafejo Ferstik, kiun malfermis la AEF-Landestro de Burgenland, s-ano Bauer.

Dr. Grimme, Wien, nome de la AEF-estraro instigis la geesperantistojn en Burgenland al plua aktiveco. S-ano R. Cech, Wien, salutis nome de la „Esperanto-Amikoj", sciigante, ke la societo reaktiviĝis kaj petis je kunhelpo. S-ano Rainer, Ob. Pullendorf, esprimis sian ĝojon, ke li povas ree saluti gastojn en Burgenland. Sekvis salutvortoj de s-anoj Schwarz, Felixdorf; Paseka, Sauerbrunn; E. Vokal kaj M. Finkenzeller, Wien.

Posttagmeze okazis migrado al la malnova kastelo Forchtenstein. Aliaj vizitis la belan kuraclokon Sauerbrunn, kie ilin salutis s-ano Wrus. La renkontiĝo denove firmigis la amikajn rilatojn inter la E-grupoj de la najbaraj federaciaj landoj.

E-klaso de Kirchbichl, Tirol

ekskursis kun sia instruisto al monto proksime de la loko kaj sendis per poŝtkarto E-salutojn al la E-Centro en Wien. La estraro de AEF tre ĝojis pri tio, reciprokas la salutojn kaj deziras al la junaj studantoj de Esperanto ĉe la popollernejo de Kirchbichl multan sukceson.

Geedziĝoj

La 16. 7. 1949 geedziĝis s-ano profesoro Robert K. Frühmann, estrarano de AEF, E-parolanto ĉe radio Wien kaj kunlaboranto en la E-servo de AEF, kun f-ino Renate M. Fleischmann. Franz Heiderer, unu el la plej fervoraj kunlaborantoj en la Esperanto-Centro, edziĝis la 27. 8. 1949.

Ni deziras al la junaj geedzaj paroj ĉion bonan por la estonto kaj favorema sorto ŝirmu la novajn porvivajn ligojn.

Aŭstriaj gazetoj kun konstanta Esperanto-rubriko

Die Frau (Wien), Der Wanderer (Reisezeitschrift, Graz), Der Naturfreund (Wien), Volkszeitung, Tiroler Nachrichten, Volksbote, Tiroler Tageszeitung (Innsbruck), Haller Lokalanzeiger (Solbad Hall).

Plezure ni publikigas ĉi tiun liston, dankas al la redakcioj de la nomitaj gazetoj pro la grava apogo de nia kulturmovado, petas la geesperantistojn, ke ili siavice abonu kaj abonigu ĉi tiujn gazetojn, kaj esperas, ke ni baldaŭ povos pligrandigi la cititan liston per aliaj gazetoj, kiuj sekvos ĉi tiun imitindan eszemplon.

Librovendejo TRAMONDO

prizorgas ĉiujn viajn librodezirojn kaj havigas al vi ne nur ĉiujn haveblajn E-librojn, sed ankaŭ volonte ĉian literaturon en germana aŭ alia lingvo. TRAMONDO servas ankaŭ al viaj gekonatoj. Tial, bezonante literaturaĵojn, konigu viajn dezirojn al kaj mendu nur ĉe via librovendejo: TRAMONDO, Wien I., Neutorgasse 9.

Aniĝu al la fakgrupoj!

Kiel jam sciigite, fondiĝis en la kadro de AEF fakgrupoj de esperantistaj instruistoj, fervojistoj, poŝtistoj, tramistoj, katolikoj, naturamikoj kaj gejunuloj.

La fakgrupoj refoje petas ĉiujn geesperantistojn aliĝi al la respektiva grupo por tiamaniere kunhelpi en la disvastigado de Esperanto inter sia faka kolegaro. Anoncojn akceptas la E-Centro, Wien I., Neutorgasse 9.

Nekrologoj

Neatendite mortis en Majo en Wien nia aktiva kunlaboranto kaj estrarano de AEF s-ano fakinstruisto Josef Geißler, kiu depost kelkaj jaroj gvidis la Esperanto-lektoraton ĉe la altlernejo por mondkomerco. Estante modesta homo, s-ano J. Geißler laboris en la E-movado silente kaj senegoiste kaj ĝojis pri ĉiu studento, kies intereson li povis veki por Esperanto. AEF perdis en li fervoran kunlaborinton kaj konservas al li dankeman memoron. Aro da vienaj ges-anoj ĉeestis lian entombigon kaj s-ano profesoro d-ro H. Sirk parolis adiaŭajn vortojn.

Mortis la 24. 5. 1949 en Innsbruck la malnova E-pioniro Christian Wulz en aĝo de 72 j. Certe multaj geesperantistoj memoras la viglan blankharulon, neniam mankintan en niaj aranĝoj. Li ankaŭ gvidis siatempe multajn kursojn. La tirolaj ges-anoj tenos la mortinton en daŭra, bona memoro.

Adiaŭo de la redaktoro

Nenio en la vivo daŭras eterne kaj ĉio estas submetita al ŝanĝo. Tiel ankaŭ la funkcio de redaktoro pro iu kaŭzo iam devas ĉesi kaj jen, tio estas la lasta numero de AER redaktita de mi.

De post la rekonstruo de AEF en 1945 per la konfido de la aŭstria esperantistaro — esprimita en la pasintaj jarkunvenoj — mi okupis la funkcion de redaktoro de la organo de nia movado. El la simpla komenco per la „Mitteilungsblatt“ ni kreis en Aŭgusto 1946 per niaj komunaj fortoj la monatan gazeton

„Aŭstria Esperanto-Revuo", kiu baldaŭ akiris reputacion en- kaj eksterlande.

Per miaj modestaj fortoj mi laŭpove klopodis redakti nian organon laŭ la superpartia principo de la aŭstria Esperanto-movado kaj mi devas konjekti, ke mi laŭcirkonstance per mia laboro trovis la relativan kontenton de nia legantaro, ĉar neniam alvenis seriozaj plendoj aŭ riproĉoj pri la redaktado.

Ke mi tamen ne plu povis akcepti la redaktorecon estas motivigita en tio, ke mi kor-malsaniĝis depost du jaroj kaj mia nuna sanstato ne plu permesas al mi daŭrigi la temporaban kaj nervostreĉan laboron de redaktoro.

Adiaŭante do de mia funkcio, mi kore dankas al ĉiuj ges-anoj, kiuj min subtenis en mia agado per artikoloj kaj aliaj kontribuaĵoj por AER aŭ per korektoj de la manuskriptoj, kaj mi estas certa, ke la nova redakcia komitato same kontentige laboros por la movado, eble eĉ mian laboron superos, por kio mi sincere esprimas al ĝi miajn plej bonajn dezirojn.

Alfred Berdan.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

Kongresa fakkunsido de Laborista Esperantistaro

en Graz okazis la 18. 7. 1949. Prezidis k-do L. Sager, protokolis k-do F. Haiderer. Partoprenis 60 gek-doj.

K-do Sager malfermis la kunsidon, salutparolis kaj nekrologis la mortintajn ALE-anojn k-dino Anna Zottl kaj k-do Leo Wirth. En la raporto pri la agado de Aŭstria Laborista Esperantistaro (ALE) li konigis jenon: Okazis dum la raportjaro 12 kunvenoj, 8 kunsidoj de funkciuloj, 3 socialistaj kunvenoj kaj manifestacioj okaze al la Unua de Majo ĉijare. ALE havigis al si presilon je la prezo de ŝ 1500.— helpe de subvencio de la Sindikata Ligo de ŝ 1000.—, kaj presis ĝis nun 55 diversajn presaĵojn kiel ekz. flugfoliojn, invitilojn k. s. La kvanto estis inter 200—4000 pecoj. ALE ĝis nun eldonis jenajn presaĵojn: Proleta Kantaro n-roj 1 kaj 2; — Ĉu milito estas venkebla? — Libereco por Grekio! kaj Ni kantu (10 kantoj). La ALE-biblioteko nun konsistas el 76 libroj, plejparte laborist-tendencaj. La mortinta k-dino Zottl posedis propran E-standardon, kiun nun heredis la komunista frakcio de ALE.

La fakkunsido decidis likvidi la ĝisnunan organizan formon de ALE kaj fondi apartajn SPÖ- kaj KPÖ-frakciojn en la kadro de AEF. Tiu decido naskiĝis el la konsidero, ke estas pli oportune enpenetri en la respektiva partio politika, en la sindikato aŭ junulara-organizo, varbi tie por Esperanto kaj per tio alvenigi al la ĉeforganizo de AEF novajn membrojn.

La SPÖ-Frakcion estras k-do Ludwig Sager kaj la KPÖ-Frakcion k-do Franz Haiderer. La fakkunsido krome decidis krei komunan kulturkomitaton inter ambaŭ frakcioj, kiu okazigu komunajn kultur-aranĝojn. La protekton super tiu kultura komitato afable transprenis eksministro k-do d-ro Hans Frenzel.

La financan raporton de ALE faris la kasistino k-dino Steffi Krautschneider kaj k-do F. Stöckl por la kontrolo proponis la senŝarĝigon de la ALE-estraro. kiun la kunsido unuanime konsentis.

Enspezoj

Kotizoj	ŝ	383.—
Vendo de konstruŝtonoj		792.—
Subvencio de S. L		1000.—
Vendo de broŝuroj		225.65
Preslaboroj		103.—
Div. enspezoj		155.—
Sumo	ŝ	2658.65

Elspezoj	
Por presaĵoj	ŝ 248.30
Presmaŝino	1500.—
Presliteroj	100.—
Afranko	194.74
Div. elspezoj	307.58
Saldo la 15. 7. 1949	308.03
Sumo	ŝ 2658.65

Pri la tagordo estiĝis vigla diskuto. Sager (Wien): La kaŭzo pro la nekontentiga funkcio de ALE estas la duobla kotizo al AEF kaj ALE. Tial ni decidis ne plu enkasigi specialan kotizon por ALE. Finkenzeller (Wien): Preskaŭ ĉie laboras la samaj gek-doj kaj la aliaj flankenstaras. Ni devas serĉi novan vojon. Bouché (Wien): Por povi vivi ĉiuj organizoj konstante bezonas monon, tamen en la nunaj cirkonstancoj la homoj ŝparas je ĉiu groŝo. Lang (Steyr): Du politikaj ekstremoj en grupoj ne povas ekzisti, ĉar politikumo en la grupoj ofendas aŭ la unujn aŭ la aliajn, ni restu neŭtralaj. Loibel G. (Wien): La starigo de socialista kaj komunista frakcioj laboristaj estas speciale nur por Wien. Petante la respektivan politikan partion pri subteno de la laborista E-movado, oni ĉiam demandas „ĉu vi estas socialistoj?“ aŭ „ĉu vi estas komunistoj?“ ktp. s. Se ni respondas, ke ni estas unueca organizo, ni nenion atingas, nek ĉe tiu, nek ĉe alia partio. Tial pro oportunaj kialoj ni disiĝas, sed kulture ni kunlaboros. Feilbacher (St. Pölten): En la provinco la laboro estas pli malfacila ol en Wien. La grupoj devas resti neŭtralaj por povi akiri sukcesojn. Nederlanda k-do (kiel gasto): Ni en Nederlando havas 4 E-organizojn, tio certe estas tre stranga kaj ankaŭ bremsas la evoluon de la movado. Vi en Aŭstrio estas pli saĝaj havantaj nur unu tutorganizon AEF. Se ni ĝin havus, ni atingus pli da sukcesoj. Tamen fakaj organizoj ankaŭ devas ekzisti, ili estas la motoroj de la ĉefa organizo. Haidierer (Wien): Ekzistas miskompreno. Precipe mi turnas min al la provincaj k-doj. Ne disigu viajn grupojn en diversaj politikaj frakcioj, restu nepre neŭtralaj kaj kunlaboru kun ĉiuj esperantistoj amike. Ekster via grupo vi estas esperantisto privata kaj ankaŭ havas politikan koncepton kaj praktikas ĝin en via partio. Sed por fari E-propagandon ĉe SPÖ aŭ KPÖ vi ne povas komisii ÖVP-anon kaj inverse. Tion ni prizorgu kiel partianoj de la respektiva partio. Stöckl (Wien): Ni ne preterlasu la gravan taskon por propagandi Esperanton en la sindikatoj kaj junularaj organizoj. Schick (Leoben): Kvankam nia grupo plejparte konsistas el komunistaj esperantistoj ni tamen unuece laboras sur neŭtrala bazo kun la aliaj. Loibel M. (Wien): Vera kunlaboro de ĉiuj estas necesa. La laboristoj pro sia plimulto povus atingi pli da enfluo en ĉiuj branĉoj de la organizo. Vokal (Wien): Mi konfirmas la vortojn de k-dino Loibel, ĉar vivanta AEF estas vivantaj frakcioj ĉiutendencaj. Per tio finiĝis la diskutado, la kunsido voĉdonis pri la proponita kulturkomitato, kio kontraŭ nur unu voĉo estis akceptata. La komitatanoj estos elektataj en la frakciaj kunsidoj en Wien.

Podrepschek (Graz): La saman tagon, kiam malfermiĝis la kongreso en Graz, la socialista gazeto „Neue Zeit“ skribis artikolon kontraŭ Esperanto. Ni sendis al la redakcio delegacion por klarigi la aferon kaj oni diris al ni: „Kial vi estas tiel inertaj, Vi mem kulpas kiel socialistoj, ĉar vi ne venis antaŭe al ni por klarigi nin ...“ La fakkunsido do decidis sendi delegacion esperantistan al la socialista „Neue Zeit“ kaj al la komunista „Wahrheit“.

Per tio finiĝis la kunsido, kiu produktis fruktodonajn instigojn por la estonta agado de la laboristaj esperantistoj.

Rezolucio al la SAT-Kongreso en Parizo

En la SAT-kunveno dum la aŭstria E-Kongreso en Graz la sekvanta rezolucio unuvoĉe estis akceptata kaj sendata al la SAT-Kongreso:

La ĉeestantaj SAT-anoj dum la aŭstria E-Kongreso en Graz la 18an de

Julio 1949 komisias la SAT-estraron, ke SAT estu vera internacia laborista E-organizo de ĉiuj laboristaj tendencoj, ke ĝi donu en sia organo „Sennaciulo" la parolon al ĉiuj direktoj de la diversaj politikaj tendencoj sur la bazo de reciproka estimo.

Samtempe ni proponas, ke „Sennaciulo" evitu la neologismojn.

ASKÖ simpatias al Esperanto

Okaze al la landa kongreso 1949 de la Laborista Ligo por Sporto kaj Korpa Kulturo la estraro de ALE sendis al la nomita kongreso salutleteron kaj disdonis inter la sportdelegitoj poresperantajn flugfoliojn.

Responde al la letero la estraro de ASKÖ letere konigis al ALE rezolucion akceptitan dum la kongreso, kiu tekstas: „La Landa Kongreso de ASKÖ dankas por la frataj salutoj de la laboristaj esperantistoj kaj reciprokas ilin plej kore. La laboristaj sportuloj de Aŭstrio deklaras sin solidaraj kun la celoj de la aŭstriaj laboristaj esperantistoj."

Socialista frakcio de AEF

La 22. 6. 1949 okazis kunveno kun varia programo. Komuna kantado, socialistaj poemoj, esperanta solkanto, germana leciono por esperantistoj, humoraĵoj ktp. alternis. Tre interesaj estis la laŭtlegado de gravaj artikoloj el diversaj eksterlandaj gazetoj esperlantaj.

Sed la plej interesa programpunkto estis la raportoj pri la E-kongresoj de GEA en Göttingen kaj de la fervojista mondfederacio IFEF en Aarhus, pri kiuj parolis niaj k-doj Katzianka kaj Zink, al kiuj raportoj sekvis vigla debato.

Fine k-do Loibel instigis la ĉeestantojn al kunlaboro por la aŭtuna agado. Disvastigante Esperanton ni kunhelpas interfratigi la homaron kaj interfratiĝo malhelpos la mizerigajn militojn.

Gek-doj ne forgesu, ke ĉiun 4an merkredon en la monato la socialista frakcio de AEF kunvenas en la Centro, I., Neutorgasse 9, je la 17.00 h kaj partoprenu regule.

„Solidarität",

la centra organo de la Aŭstria Sindikata Ligo, aperigis en n-ro 77/1949 noton titole: „Lernt Esperanto!", per kiu la gelaboristoj estas atentigataj lerni Esperanton pro pli bona internacia interkompreniĝo.

Komunikoj de la Komunista Frakcio de AEF

Dum la E-Kongreso en Graz du delegacioj vizitis la redakcion de „Wahrheit", la komunista organo por Stirio, kiu antaŭ la kongreso skribis favoran artikolon pri la E-movado. Ĉe eksterlandaj k-doj estis tie kaj parolis kun la redaktoroj, kiuj miris pri la bona interkompreniĝo per Esperanto, pri kio ili ankaŭ skribis en la gazeto. La 20. 7. 1949 aperis en ĝi alvoko, rekomendanta Esperanton al la laborista klaso.

Nun dependas de vi, karaj k-doj, ke vi intime kontaktu kun la komunista frakcio de AEF pri viaj esperantistaj aferoj. Skribu al ni viajn plenajn adresojn, por ke ni povu ordigi nian kartotekon. Ni ne postulas de vi novan kotizon, sed bezonas vian simpati-deklaron, kiun vi sendu al la Komunista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9.

„Orienta Raporto", nova E-gazeto aperis kun tre interesa enhavo. Ni citu jenajn artikolojn: La nuntempa milita siutacio en Ĉinio. — Kiel la ĉina popolo venkas. — La grava deklaro de la ĉina kompartio. — Nuntempa politika situacio en Siamo ktp. Adreso: „Orienta Raporto", 855, Sapan Lerng, BANGKOK, Siam.

Legu niajn eldonaĵojn: Proleta Kantaro n-ro 1 kaj 2 (po 20 g) — Ĉu milito estas evitebla? (50 g) — Ni kantu! (10 kantoj ŝ 1.—) — Libereco por Grekio (20 g). Havebla ĉe la Komfrakcio per alsendo de poŝtmarkoj kaj aldono de 20 g por afranko.

Kanto pri fervojisto

(Dediĉita al la viena kongreso de fervojistaj esperantistoj la 2. — 3. 4. 1949, publikigita en „Esperantisto Slovaka" n-ro 4-5/1949).

Sur relpar' en vasta mondo
kantas radoj de la trajn':
„Fervojisto, fervojisto
estas hom' ne kia ajn!"

Li per Esperant' fratiĝas,
tuta mondo konas lin;
sub flugilrad' amasiĝas
kaj sub stel' kun pintoj kvin.

Li per relruband' kunligas
landojn de la granda mond',
verdstelanojn amasigas
per la trajn' al frata rond'.

„Fervojisto, fervojisto
estas hom' ne kia ajn,"
sur relpar' en vasta mondo
kantas radoj de la trajn'.

St. R. Seemann.

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Kongresa Di-servo en Graz

okazis la 17. Julio je la 8a matene en la preĝejo de „Ursulinoj". Pastro P. Pius Lenz el Klagenfurt celebris. La s-anaro kantis la Schubert-meson laŭ la Kantaro Katolika de L. Chiba. P. Bruno Hebenstreit, Graz, laŭtlegis la sanktan evangelion kaj predikis pri la temo: Sankta Francisko de Assisi, patrono de la katolikaj esperantistoj. La sanktulo kun siaj profunda amo al Dio kaj vere universala amo al la homoj estu modela por ni katolikaj esperantistoj. Ankaŭ en nia penado kaj agado por kaj per Esperanto sole la amo, karito kaj pac-amo estu la motivoj kaj celoj!

Fakkunveno de la katolikaj esperantistoj

en la salonego de la monahineja domo sub prezido de d-ro Adolf Halbedl kunigis la katolikajn samcelanojn por pritrakti siajn specialajn aferojn. La kunvenprezidanto salutis la AEF-prezidanton, eksministron d-ron Hans Frenzel kaj kortegan konsilanton Hugo Steiner, la ĉeestantajn sep pastrojn, inter ili la sukcese predikinton kaj speciale s-anon Alois Koudulka, la nestoron de la Graz-aj ges-anoj.

D-ro Frenzel salutis ka fakkunvenon nome de AEF kaj deziris al ĝia laboro plenan sukceson. Kort. konsilanto Steiner diskonigis la ideon, ke unu el la sekvontaj E-mondkongresoj okazu en Graz. D-ro Halbedl salutis ankoraŭ prof. Christanell el Salzburg kaj kore memorparolis pri la bedaŭrinde antaŭ tri tagoj mortinta meritplena s-ano kalkulkonsilanto Rudolf M. Frey, kiu devis nin forlasi por ĉiam. R.I.P.

D-ro Halbedl en sia parolado menciis la Germanan E-Kongreson en Göttingen, la spertitan modelan sintenon kaj akcelon de Esperanto kaj la subtenon de la katolika E-movado flanke de la tieaj episkopoj, samkiel faras tion la ĉefepiskopo de Salzburg d-ro Rohracher. Sed la parolanto forte priplendas la mankon de tia sinteno al Esperanto en la stiria diocezo kaj esprimas la grandan bedaŭron pro la neĉeesto de eklezia reprezentanto ĉe la solena malfermo de la Esperanto-kongreso malgraŭ sendita honor-invi-

tilo. Same priplendinda estas la neintereso de la junularo. Speciala tasko por niaj pastroj estus konvinki la junularon en la kamparo por Esperanto. Vere kamparaj E-fervoruloj kaj pioniroj estas la s-anoj Hollerer (Stirio) kaj Preining (Supra-Aŭstrio) k. a. Plua nia celo estas: Esperanto por la Misioj, por kio la parolanto jam multe penadis laŭ sugesto de episkopo Hudal. D-ro Halbedl esprimas la ĝojon pro la sukcesoj de P. Carolfi por Esperanto okaze de la Sankta Jaro 1950.

S-ano E. kiel gasto esprimis sian ĝojon pri la kunveno, konfesante, ke li ĝis nun ne sciis, ke eĉ ekzistas katolika E-movado.

S-ano Mudrak, Wien, transdonis la salutojn de la AKLE-prezidanto, kiu pro dejoraj kaŭzoj ne povis ĉeesti kaj raportis koncize pri la katolika E-agado en la ĉefurbo kaj menciis la helppretan sintenon al Esperanto de la kardinalo ĉefepiskopo d-ro Th. Innitzer, kiu laŭ peto de P. Carolfi ankaŭ eniris la Honoran Komitaton de la 22a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso en Romo, la 10. — 17. 8. 1950.

Rilate al organizaj aferoj d-ro Halbedl akcentis, ke ankaŭ la germanaj katolikaj esperantistoj en Göttingen decidis esti faka grupo de GEA kaj ne formi apartan ligon ekster la Germana E-Asocio, same kiel nia AKLE estas faka grupo de AEF. Li dankis ankoraŭ al s-ro prof. M. Korn pro ties majstra orgenludado. Per la solena kanto „Ni volas Dion" finiĝis la interesa kaj vigla kunveno. M.

Princepiskopo d-ro A. Pawlikowski, Graz

akceptis la viziton de la pastroj P. Lenz kaj prof. Christanell kun s-ano Mudrak. La episkopa moŝto bedaŭris, ke la reprezentanto por la malfermo de la E-kongreso, de li delegita, pro urĝaj oficaj taskoj ne povis veni. Por iel rebonigi tion, la episkopo sendis Domkapitularon d-ron Pochus Kohlbach al la aranĝo de la Aŭstria E-Instituto. Tiu sekvis kun streĉa atento la unikan germanlingvan paroladon de prof. Hainschegg pri Esperanto kaj mondliteraturo. Same li kun intereso aŭskultis la esperantlingvan paroladon de s-ano Ernst Werner pri Internacia Esperanto-stilo.

Jarkunveno de AKLE, Wien

okazis la 24. 5. 1949 en ĝia hejmo. Prezidis s-ano d-ro M. Führing. Salutis la kunvenon nome de AEF la afergvidanto R. Cech. Raportis pri la agado de AKLE sekretario W. Mudrak.

La kunvenintoj esprimis sian sindonon al la ĉefepiskopo kardinalo Th. Innitzer pro lia protekto de Esperanto. Ili ankaŭ dankis al la Katolika Gazetara Centro (Kathpress) pro la modela helpo sur la gazetara kampo kaj elparolis dankegon al liga kanceliero d-ro Figl kaj instruministro d-ro F. Hurdes pro ilia unika subteno kaj sinkonfeso por Esperanto.

La novelektitan estraron konsistigas: Sekcia kons. d-ro M. Führing, prezidanto; kalkul-kons. L. Siedl kaj prof. d-ro E. Görlich, vicprez.; W. Mudrak, afergvidanto kaj sekretario; P. Georg Plank, pastra konsilanto; s-inoj H. Kaes kaj E. Eigner, kasistinoj. Pluaj estraranoj: S-inoj d-ro B. Flasch, Chr. Siedl, A. Crignis, S. Scherpon, V. Winkelhofer, H. Schreiber kaj s-anoj K. Ryba, L. Huber kaj instruisto Kainz.

Liglandaj komitatanoj: d-ro A. Halbedl kaj instruistino Konrad (Steiermark). Eventuale kompletigota dum la kongreso en Graz.

„La ĝusta vojo"

Cirkulero por katolikaj esperantistoj, eldonita monate de s-ino Maria Schöttl Schulstr. 26/I, München, Germanujo.

Nia ĉefepiskopa kardinala moŝto d-ro Th. Innitzer skribis responde al la senditaj al li ekzempleroj de tiu publikigaĵo: „... Mi dankas pro la valora revuo kaj akompanas kun simpatio viajn klopodojn..."

La numero de Aprilo 1949 enhavas ankaŭ resuman represon de nia „Letero el Aŭstrio.

„Al altaro de Dio“

Katolika preĝareto prilaborita de L. Thalmaier, sacerdoto, kun eklezia permeso. Enhavo: la neŝanĝeblaj partoj de la sankta meso; la mespreĝoj de la pentekosta festo; la ĉefaj katolikaj preĝoj k. t. p. Prezo: 1 DM aŭ 4 resp. kup. Mendebla ĉe: Katolika E-Centro, Mittermayerstraße 18, München 13, Germanujo.

Vere ĝojiga kaj rekomendinda libreto por katolikaj esperantistoj. Bedaŭrinde la teksto de la „Saluton Mario“ ne plene akordiĝas kun la oficiala originalo. Vidu Aŭstria E-Revuo 3-4/1949, pĝ. 39. Tamen ni gratulas al K. E.-Centro en München kaj ĝia sacerdoto.

W. M.

Revigliĝo de kat. E-movado en Hispanujo

Pastro Felix de Valois Arana de la Kongregacio de la misiistoj, filoj de la sankta koro de Mario, raportas, ke li kun katolika junularo laboras por Esperanto. Li inter alie eĉ skribis al la hispana ministro por nacia eduko kaj instruado tiucele kaj ricevis respondon laŭvortan: „Oni kun plezuro pripensos la enkondukon de Esperanto en la hispanajn lernejojn ...“

Jen por Esperanto ĝojiga informo, post kiam oni lastatempe en diversaj E-gazetoj legis pri bedaŭrinda persekuto kontraŭ esperantisto sur la Kanariaj insuloj, apartenantaj al Hispanujo.

W. M.

Internacia ESPERANTO-MOVADO

IFEF-Kongreso 1950 en Salzburg

Dum la 2a kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj en Aarhus akceptiĝis propono, ke la kongreso de IFEF en 1950 okazu inter la 1. — 15. Majo en Salzburg, Aŭstrio.

La fervojistaro en tutmondo jam nun estas atentigata, ĝustatempe aranĝi siajn aferojn, por ke laŭeble multaj gekolegoj povu partopreni la kongreson kaj krom la laborkunsidoj ĝui la belegajn pejzaĝojn kaj vidindaĵojn de Aŭstrio. La aŭstriaj esperantistaj fervojistoj klopodos aranĝi la kongreson kiel eble plej kontentige. Pli detalaj informoj sekvos ĝustatempe.

La germana Esperanto-kongreso 1949

La 4. — 9. 6. 1949 okazis en Göttingen la dua postmilita E-kongreso de Germanujo, kiun partoprenis 1100 gesanoj, inter ili 60 eksterlandaj delegitoj el 10 diversaj landoj. La aranĝo de la kongreso estis modela kaj ĝoje oni povis konstati, ke inter la gekongresanoj estis multaj gejunuloj bone regantaj nian lingvon.

La 4. Junio je la 16a h. komenciĝis la interkonatiĝa vespero, donanta al la ges-anoj la eblon trovi novajn kaj malnovajn geamikojn. Je la 18.00 h. la urbestro de Göttingen akceptis kongresan delegacion konsistantan el la eksterlandaj delegacioj kaj akceptis la gvidantaron de la germana E-movado en la bela urbdomo, kiu estis ornamita per granda verda stelo kaj verda flago.

Post la di-servoj komenciĝis dimanĉe antaŭtagmeze la solena malfermo. Inter multaj salutparoladoj oni aŭdis la kulturministron de Hessen paroli en Esperanto. S-ano Schuchman transdonis la salutojn de la germanaj fervojoj kaj menciis, ke la ĝeneraldirekcio de la germanaj fervojoj aprobis Esperanton kaj ke ĝi estas instruata en la fervojaj faklernejoj. S-ino Isbrücker, Nederlando, transdonis flagon al la esperantistoj de Kolonjo, kiu dum la Hitlera reĝimo estis kaŝita en Nederlando. Salutparolado sekvis salutparoladon. Posttagmeze okazis la ĝeneralkunveno de la Germana E-Asocio. Lunde okazis diversaj fakkunsidoj.

Marde kaj merkrede multaj interesaj prelegoj okupis la kongresanojn. Kvankam bela vetero logis al ekskursoj, la plej granda parto de la kongresparto-prenantoj aŭskultis la paroladojn de la s-anoj Agamjan, Mason Stuttard, Andreo Ceh, Theo Jung, Sayers, Neergard, Cortvriendt kaj s-ino Isbrücker.

Varbkunveno montris bonan viziton de la enloĝantaro de Göttingen. Dum la kongreso funkciis bela ekspozicio, libroservo, speciala poŝtoficejo kun aparta poŝtstampo. Per diversaj ekskursoj en la ĉirkaŭon de Göttingen finiĝis la dua postmilita E-kongreso germana, montrinte, ke malgraŭ malbonaj vivkondiĉoj nia ideo tamen bone progresas en nia najbara lando.

Esperanto ĉe la germanaj fervojoj

En Germanujo preparĝas la preskaŭ deviga enkonduko de Esperanto por la oficistoj de la Deutschen Reichsbahn (germanaj fervojoj). La ĝenerala direktoro d-ro Busch (Buŝ) simpatias al tiu plano, sed bezonas skribajn instigojn el la eksterlando kiel bazon por siaj decidoj. Tial sendu el tuta mondo leterojn kun viaj demandoj, opinioj, sugestoj kaj informpetoj pri la germanaj fervojoj esperantlingve al ĝeneraldirektoro d-ro Busch, Hauptverwaltung der Deutschen Reichsbahn, Offenbach am Main, Bieberer Str. 59.

Bonvolu legi la ĉirilatan detalan artikolon en „Heroldo de Esperanto", aguli ĝi kaj sendu kopion de via letero al la afergvidanto de la fervojista sekcio de GEA, Friedrich Majer, (13 b) Holzkirchen, Obb., Bahnhofplatz 7, Germanujo, US-Zono.

D-ro Albert Steche

la iam longjara prezidinto de la Germana E-Asocio kaj internacie fama lingvisto mortis en sia 82a vivjaro jam la 28. 9. 1943, kiu doloriga sciigo pro la specialaj cirkonstancoj germanaj nin atingis nur nun. Lia urno troviĝas en la familia tombo de Leipzig-Plagwitz. Certe ankaŭ multaj el la malnovaj aŭstriaj geesperantistoj bone memoras lin kaj liajn poresperantajn laborojn. Precipe gravaj estis liaj originalaj traktadoj pri Esperanto kaj la komerco. La grandan libraron de d-ro A. Steche lia plej aĝa filino donacis al la esperantistaro, parton de ĝi ricevos la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

La germana kaj internacia esperantistaro certe neniam forgesos la tiom fervoran kaj al nia ideo sindonan kunlaboranton.

E. Koblischke, Wittenberg.

Pri la Esperanto Film-Grupo

La 15. 6. 1949 en sia jarraporto la prezidanto, s-ro Derks, konstatas ke la membroj povas esti kontentaj pri la akiritaj rezultoj. La korespondado amasiĝis. Por la propagando oni elspezis multajn centojn da ned. guld. Kun 79 landoj la prezidanto korespondis. La financa bazo estas sana. Multaj en- kaj eksterlandaj gazetoj menciis la E. F. G. En 32 landoj nun estas perantoj kaj reprezentantoj. La interes̆o por la filmstrioj estas kontentiga.

En la fino de sia raporto la prezidanto denove atentigas pri tio, ke la celo de la grupo estu kaj restu la aplikado de Esperanto. Per unuigitaj fortoj kaj helpe de s-ana kunlaboro E. F. G. tenos sian bonan nomon. Adreso: Esperanto Filmgrupo, Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom, Nederlando.

Internacia Ciklista Vetveturo en Č. S. R.

estas aranĝota de Sokol Vitkovicé železárny, ciklista grupo Vpřed (Antaŭen) de la 11. — 25. 9. 1949, 12 etapoj, entuta distanco 1830 km. Starto kaj celo estas en Ostrava. La aranĝkomitato eldonis plurlingvan, ankaŭ E-lingvan, programon pri la vetveturo. Informoj de: Tour de Č. S. R. en Ostrava, Č. S. R.

Radio Paris

nun elsendas ĉiutage Esperanto-programon de la 18.15 — 18.30 h. MET.

E-prospekto pri Bratislava

Okaze al la III. Slovaka E-Kongreso (30. 7. — 1. 8. 1949) aperis E-lingva ilustr. faldprospekto pri la slovaka ĉefurbo Bratislava, kiun sendos al vi laŭpete la Oficejo por vojaĝtrafiko Slovakotour en Bratislava, Č. S. R.

Sen komentario ...

En internacia urbo, asertas la londona ĵurnalo „Daily Herald", delegito pri gazetara libereco restis netrovebla. Fine oni trovis lin ĉe alia konferenco, kie — en apuda strato — kunvenis internaciaj radio-teknikistoj.

Tiu delegito ĉeestis ĉiujn kunsidojn de la radio-teknikistoj ne rimarkante sian eraron, ĉar li parolis neniun el la lingvoj uzitaj en ambaŭ konferencoj ...

(El „Svisa Espero" V/49).

Interliga Komitato por Mond-Registaro

(Adreso: 20, Buckingham Street, London, W. C. 2, Anglujo)

La unuigo de la mondo fariĝis nepra necesaĵo por la tuta homaro. Gi postulas tutmondan perspektivon kaj la starigon de supernaciaj institucioj por sukcese lukti kontraŭ la komunaj problemoj de la homaro. La politikaj, ekonomiaj kaj sociaj organoj, kiujn oni urĝe bezonas mondskale por certigi la pacon, la justecon kaj la bonfarton por la mondanaro, devos esti plenaj de konvinko, ke la homaro estas fundamente unu.

Ni sekve konsilas, ke, uzante, kiam eblos, la ekzistantan aparaton de la Unuigitaj Nacioj, oni iom post iom kreu M o n d - R e g i s t a r o n, kies unuaj kaj plej fruaj institucioj estu tiuj, kiuj estas plej urĝe bezonataj, aŭ por kiuj jam ekzistas disvastigita popularo akceptemo. La disvolvigo de Mond-Registaro kompreneble ne forprenus de naciaj registaroj ilian plenpovon en aferoj, kiuj havas nur nacian amplekson.

Sen deklaro de rigida agadplano je la nuna etapo, la sekvantaj paragrafoj resumas la ĉefajn taskojn de Mond-Registaro:

Mond-Administracio. La evoluigo de internaciaj funkciaj kaj fakaj organizoj, ekzemple ILO, UNESCO, Monda Atoma Evoluiga Instanco, Monda Nutra Administracio kaj Mondaj Aervojoj, por krei kiel eble plej rapide administracian sekcion de Mond-Registaro, por ke ĉiuj popoloj ricevu tiun vivnivelon, kiun hodiaŭ ebligas la moderna scienco kaj la kuna planado de reciproka partopreno al la riĉfontoj de la tero.

Mond-Civitaneco. Carto de Universalaj Homaj Rajtoj kaj Devoj, kiu garantios la kvar liberecojn al ĉiu ano de la monda komunumo.

Mond-Parlamento. Reprezentantaro rekte elektita el la popoloj kun povo fari leĝojn pri difinitaj aferoj de universala intereso.

Mond-Justeco. La starigo de Monda Superega Tribunalo, kiu estos la akceptita organo por apliki kaj interpreti Mond-Leĝojn kaj por decidi internaciajn disputojn.

Mond-Ordo. La forigo de naciaj armiloj, kaj la Mondinstanca estrado de polico sufiĉe forta por aresti individuojn, kiuj malobeas Mond-Leĝojn.

(Ekstrakto el esperantlingva cirkulero de la nomita komitato.)

Bibliografio

Koran bonvenon en Graz!

Titolo de ilustrita prospekto eldonita okaze al la Aŭstria E-Kongreso 1949 en Graz de la Urboficejo por Kulturo, Sporto kaj Fremdultrafiko en kunlaboro kun la Landa Fremdultrafika Oficejo kaj Loka Kongresa Komitato.

En la nomita prospekto la kongresanoj trovis krom la tre detala kongresprogramo salutvortojn de la Landestro de Stirio, Josef Krainer, urbestro de Graz, prof. d-ro E. Speck kaj de diversaj kongresaj ĉeffunkciuloj de AEF.

Oni devas gratuli al la LKK pro la bonega aranĝo de la kongres-detaloj en la prospekto kaj kore danki al la eldona oficejo por la Esperantlingva eldono. Graz vere laboris modele!

Jarlibro de UEA 1949

Aperis ĵa unua parto de tiu ĉi ŝatata informilo pri la internacia E-movado en poŝformata volumo de 243 pĝ. Kiel ĉiam ĝia enhavo estas valora por ĉiuj UEA-anoj kaj funkciuloj. Speciale grava estas la adresaro de la delegitoj. La libro ne estas aĉetebla, sed nur destinita por la gemembroj de UEA.

Vortaro Deutsch—Esperanto,

ellaborita kaj eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto, poŝformato 15×11, 5×1,5 cm, bona papero, verda kartono, 354 paĝa. Ricevebla ĉe Verlag „Tramondo", Vieno I., Neutorgasse 9, je prezo de 20,— ŝil.

Jen fine la atendadita vortaro! Kio estas lingvouzo sen la trezoro de bona vortlibro? Ankaŭ la lingvospertulo bezonas ĝin, la valoran kontrolilon por la ĝusta vortapliko. Jam AEI estis donacinta al ni la vortaron Esperanto—Deutsch kaj nun ĝi vere „donacis" al ni ankaŭ la duan parton, kiun speciale niaj novaj Esperantanoj manksentis. Tamen, ĝi ankaŭ havas prezon: ĝi kostas 20 aŭstr. ŝilingojn. Ĉu kelkaj s-anoj taksos tion alta? Ŝu, ni do rigardu la prezojn de la aliaj libroj en la vendejoj, speciale tiujn de la alilingvaj vortaroj kaj ni komparu la respektivajn eldonkvantojn kaj konsideru, ke la prezo de nia vortaro entenas efektive nur la kostojn de la papero kaj la preso. Ĉar la tuta pena kaj konscienca laboro estas idealista donaco de pluraj membroj de nia E.-Instituto, kiuj oferis siajn tempon, energion kaj scion por la prospero de nia landa movado. Ĉu oni povas imagi por la daŭro nian movadon sen tiu grava helpilo?

Kaj nia aŭstria vortaro estas bona kaj moderna. Ĝi entenas proksimume 20.000 serĉvortojn, kies tradukoj konformas al la nuna stato de la Esperanta lingvouzo. Nuancoj, esprimvarioj kaj sinonimoj riĉigas ĝin kaj la verkintoj kuraĝe frontis al traduko de vortoj nesimplaj. Ne ofertante ties detalegemon, ĝi tamen pro sia konciza, klara kaj preciza traduko rajte staros sur nia skribotablo apud la eminentuloj Christaller kaj Bennemann. Mi rekomendas ĝin — tuj — mendu ĝin! Hugo Kraus.

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

La Komitata kunsido de Aŭstria Esperanto-Instituto la 14an de Septembro 1949

1) r e e l e k t i s la ĝisnunan estraron, nome: d-ro Leopold Grimme, direktoro, dir. Franz Menacher, unua vicdirektoro, d-ro E. J. Görlich, dua vicdirektoro; Ernst Werner, nuna sekretario, Frieda Feichtinger, dua sekretario.

2) d e c i d i s laŭ propono de d-ro Halbedl prepari la eldonon de „Aŭstria Antologio" (kolekto de esperantigitaj verkoj de eminentaj verkistoj naskitaj aŭ vivintaj en Aŭstrio). Taŭgajn manuskriptojn — ĉu jam tradukitajn aŭ nur tradukotajn — kolektu por ĉiu federacia lando aparte la plej kompetentaj amideanoj, elektotaj interkonsente kun la landestroj de AEF. La Institutan laboradon gvidos la gekomitatanoj Cech, Gasperini kaj Feichtinger.

3) petas laŭ propono de dir. Menacher ĉiujn Esperantogrupojn, ke ili prezentu lingvajn demandojn, kiujn ili mem ne povas solvi, al la Aŭstria Esperanto-Instituto, kiu prikonsiliĝinte respondos aŭ letere aŭ en AER.

4) petas laŭ propono de s-ano Cech la Esperantogrupojn, de tempo al tempo inviti Institutanojn por lingvaj paroladoj, menciante la deziritajn temojn.

5) decidis inviti lingvospertajn gesamideanojn kunlabori kiel „simplaj membroj". Interesiĝantoj skribu al „Aŭstria Esperanto-Instituto", Wien I., Neutorgasse 9.

Vbb (Zl. 3216/1947)

La Esperanto-eldoneio

TRAMONDO

Vieno I., Neutorgasse 9

aperis jenaj Esperanto-libroj:

	šil.
Handwörterbuch Esperanto—Deutsch	7.—
Deutsch—Esperanto, Handwörterbuch eldonita de la aŭstria-E-Instituto, 354 gaĝ.	20.—
„Senhalte al la celo", legolibreto de A. Norbert	3.50
„La mondopaco kiel psikologia problemo" de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk	2.—
„Tri majstronoveloj" de Stifter, Storm, Kleist, tradukitaj de E. Pebe	3.—
„Junaĝo" de A. Stieger, tradukita de F. Th. Bischof	1.—
„La kvar paĝoj de la mondo", de la samaj aŭtoro kaj tradukinto	1.—
La prezoj por la ceteraj eldonaĵoj restas neŝanĝitaj:	
„Freude durch Esperanto", lernlibro de Hugo Steiner	5.—
„Kantaro" de la aŭstria Esp.-Federacio	2.—
„Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes" (Aŭstria Esp. Instituto)	6,—
„Tabeloj por la intua instruado de Esperanto" de Fr. Mestan	1,50
„La mortado" de H. Nothnagel, tradukita de B. Selzer	2,—

Ĉiu esperantisto aĉetu almenaŭ u n u libron por si aŭ eksterlanda amiko, por helpi per tio al la plua eldonado de Esperanto-libroj. Mendu rekte ĉe „Tramondo" aŭ per via Esperantogrupo!

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. — Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. — Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. — Papierzuweisung 101/48/4-5, Bezugscheinnummer 61/86.